

John Ellerton,

Du lässt den Tag, o
Gott, nun enden

tradukita de Raymund Weber

John Ellerton,

Finiĝas nun alia ta-
go

*tradukita de William John
Downes*

John Ellerton,

Forpasis tiu tag',
Sinjoro

tradukita de Frieder Weigold

Argiope-informo:

La aspekto de tiu ĉi versio estas ba-
rita.

Supozeble la aŭtoro decidis tion.

1. Finiĝas nun alia tago,
jam venis la vespera hor'.
Kunvenis ni por adorado
plaĉanta al la Di-Sinjor'

2. Ni dankas Vin, Savanto
nia,
ke sur la tuta mond-teren'
la sankta eklezio Via
staradas firme ĉe posten'.

3. Ruliĝas tero, brilas lumo
de ne-ĉesanta maten-glor'.
Leviĝas laŭdo, preĝ-parfumo
konstante, kiel dolĉ-odor'.

4. Ekdormas ni post sun-
subiro;
gefratoj en la okcident'
vekiĝas kun novtag-aspiro
Vin glori per viv-elokvent'.

5. Formortos mondaj impe-
rioj,
sed Via regno kreskos plu.
Al Vi sin cedos dinastioj,
Venkinto estos vi, Jesu'!

...

...

...

1. Forpasis tiu tag', Sinjoro,
Kaj profundiĝas la senlum'.
Vi gardis nin de ajn doloro.
Nin gardu ankaŭ dum nok-
tum'!

2. Ni rotacias en la tagon.
En nokta paco dormas ni.
Kaj portas lumon trans la
maro
La suno, kie brilas ĝi.

3. Senĉese kiel la mateno
Briladas super tera rond',
Eksonas laŭdo pro la beno
Al ĉiu sur la vasta mond'.

4. La suno, kiu ĵus subiris,
Ja brilas en plu fora land'!
La gloron, kiun ni admiris,
Anoncas plu preĝada kant'.

5. Pereas regnoj. Tiel estu!
Kaj sole staras via tron',
Ke sole via regno restu
Je fina tag' sub unu kron'.

Traduko de la Angla poemo "The day Thou gavest, Lord, is ended" de JOHN ELLERTON (*1826-12-16 - †1893-06-15) en la Germanan de Raymund Weber.

Arg-130-256 (2008-11-08 15:30:25)

Diese Übertragung ins Deutsche ist abgedruckt in dem Gesangbuch der Katholischen Kirche in Deutschland "Gotteslob", in der neueren Ausgabe. Der Text mit den Musiknoten findet sich auch auf der Heimseite http://www.documentacatholicaomnia.u/01p/2006-09-10,_SS_Benedictus_XVI,_Ves_er_in_der_Kathedrale_in_Muenchen,_GE.pdf.

Traduko de la Angla poemo "The day Thou gavest, Lord, is ended" de JOHN ELLERTON (*1826-12-16 - †1893-06-15) en Esperanton de WILLIAM JOHN DOWNES (*1892 - †1987).

Arg-130-302 (2004-02-04 11:38:05)

Tiu ĉi traduko aperis en la Eku-
mena Diserva Libro "Adoru",
eldonita en 2001 de Internacia
Katolika Unuiĝo Esperantista
(IKUE) kaj Kristana Esperanta
Esperanto-Ligo (KELI), kanto
numero 153.

Traduko de la Angla poemo "The day Thou gavest, Lord, is ended" de JOHN ELLERTON (*1826-12-16 - †1893-06-15) en Esperanton de Frieder Weigold.

Arg-130-932 (2008-11-08 14:22:49)

Mi, Manfred Retzlaff, ricevis tiun ĉi tradukon de la kanto en 2008-11-06 de sinjoro Frieder Weigold (Birkestr. 12, D-82178 Puchheim, Germanio), kiu mem faris la tradukon en Esperanto. S-ano Weigold verkis tiun tradukon - kiel li diris al mi - laŭ la germanigo farita de s-ro Raymund Weber. Tiu germanigo estas trovebla en la germana katolika kant-libro "Gotteslob" (= Laŭdo de Dio), n-ro 981, pli nova eldono. La teksto kun la muzik-notoj troveblas ankaŭ en la retejo http://www.documentacatholicaomnia.u/01p/2006-09-10,_SS_Benedictus_XVI,_Ves_er_in_der_Kathedrale_in_Muenchen,_GE.pdf.